



MIAJ TRAVIVAĴOJ EN LA DUA MONDMILITO – REMEMORO

Jarmila Rýžnarová

Ĉeĥa Respubliko

La 15-an de marto 1939 komenciĝis unu el la plej malfacilaj etapoj en la historio de nia nacio – okupacio de restinta parto de Ĉeĥoslovakio (ĉirkaŭhakita unue post Munkena diktato en 1938, kiam de nia ŝtato estis forigitaj la regionoj en Sudety (Sudet-germanaj distriktoj), parto de Slovakio kaj Subkarpata Rusio (Rutenio). En tiu tempo ĉiuj homoj ankoraŭ ne havis radio-aparaton, ja en multaj vilaĝoj ankoraŭ ne ekzistis elektro-kurento. Malfacilan taskon havis instruistoj, kiuj devis informi siajn lernantojn pri ekesto de “Protektorato”, kiun sub “sian protekton” prenis la Germana regno. Kaj jam en ĉiuj ĵurnaloj estis skribite, ke la germana regna soldataro Wehrmacht okupas ĉeĥajn landojn kaj aperis informoj, pri kiuj urboj estis jam okupitaj.



Grandega estis invado de germana armeo. Unue veturis tra la ĉefa strato en Pardubice motorcikloj, solaj, poste kelkaj motorcikloj kun sidĉaro, soldatoj tie sidantaj tenis mitralon aŭ pafilon, poste ŝarĝaŭtomobiloj plenaj de soldatoj kun pafiloj kaj poste tankoj. Ili okupis ĉiujn kazernojn en nia urbo kaj ĉeĥaj soldatoj devis ilin forlasi. Kelkaj lernejoj estis okupitaj kiel tranoktejoj por Wehrmacht. Niaj loĝantoj estis tre malĝojaj, ili timis la venonton.

Kiel niaj geparencoj kaj najbaroj rakontis, la germanaj soldatoj estis tre malsataj kaj kiam vidis ĉe ni plenajn vendejojn kaj sukeraĵejojn, ili komencis ĉion multe aĉeti kaj tre miris, kiam por unu germana marko ili ricevis tiom da bakaĵoj, ke ili tion ne kapablis forporti. Tiam estis kurzo 1:10. Oni diris, ke unu soldato forportis 20 kornbulkojn kontraŭ 50 fenikoj (0,50M). Do niaj ĉeĥaj homoj klopodis ekaĉeti ĉion, ĉar estis certe, ke la soldatoj ĉion elĉerpos.

Sed jam la trian tagon estis afiŝitaj anoncoj, kiuj avertis la loĝantojn antaŭ pli granda aĉetado, ke la varo povus esti al ili forprenita kaj la homoj arestitaj.

Kaj post kelkaj monatoj ĉiuj nutraĵoj estis porciumitaj, la loĝantoj ricevis nutraĵ-karteton por unu monato. Nuntempaj junaj patrinoj ne povus imagi, kiam ekzemple unu ovo por unu persono devis sufiĉi por la tuta semajno. Poste estis porciumitaj ankaŭ aliaj varoj, viando, ŝtofoj, ŝtrumpoj, ktp. La loĝantoj en vilaĝoj komence havis avantaĝon, ke ili povis bredi kuniklojn, anserojn aŭ kokinojn, sed baldaŭ ankaŭ ili devis severe registri, kiom da bestoj ili bredas, ankaŭ ili devis fordoni parton el la rikolto de grenoj kaj terpomoj.

Kiel la milito daŭris, la porciumoj de ĉio malgrandiĝis. Se iu ion ricevus sen la karto kaj germanaj oficistoj tion ekvidus, la homo estus punita aŭ arestita.



Karteto por viando por unu monato.

Post iom da tempo ni devis en niaj lernolibroj nigriĝi ĉiujn nomojn de Ĉeĥoslovakio, kaj anstataŭ tion skribi Protektorat Böhmen und Mähren, nigriĝi la nomon de prezidento de la respubliko. Aperis surskriboj en la germana lingvo, ni devis lerni germane ĉiutage kaj parkere scii kaj germane reciti, kiam kaj kie Adolf Hitler naskiĝis. En la urboj estis likviditaj statuoj de la prezidento aŭ de pluraj ĉeĥoslovakiaj eminentuloj, estis severa malpermeso aŭskulti eksterlandan radio-elsendadon sub puno de aresto aŭ morto, kaj estis kontroloj en hejmoj ktp.

Malbona situacio estis, kiam venis du gestapanoj kaj forkondukis la instruiston el la klaso dum la leciono nur pro tio, ke li estis judo. La judoj ne rajtis instrui, viziti restoraciojn, kinon, devis porti flavan emblemon JUDE. Unu nia kunlernantino, kara knabino, subite ĉesis viziti la lernejon. La instruistino diris, ke ŝi devis transloĝiĝi. Nur post kelka tempo ni estis informitaj, ke ŝia tuta juda familio estis forkondukita en koncentrejon, kie ĉiuj pereis.

Mia paĉjo estis oficisto kaj laboris en elektrejo. Neniu el nia familio sciis, ke la paĉjo en la grupo de 30 kamaradoj helpas multiplikigadi kontraŭfaŝistajn afiŝojn.

En tiu terura tago la 26.9.1939, mia panjo lavis tolaĵojn en kela lavejo en la trogo sur lavtabulo – (la elektraĵ lavmaŝinoj en tiu tempo ĉe ni ankoraŭ ne ekzistis), kaj subite ŝi sentis grandan maltrankvilon, kvazaŭ al ŝi iu rigardus. Ŝi kuris trarigardi la tutan domon, neniun ŝi trovis, sed ŝi jam ne kapablis plu labori. Ĉu io okazis al infanoj aŭ al ŝia edzo? Ŝi kuris telefoni en lian oficejon. Tie ŝi aŭdis malgajan voĉon: “Ĵus forkondukis lin Gestapo.”

Kion plu skribi: Ĉu pri tio, ke ni subite estis “familio malamika al la Regno”, ke niaj konatoj kaj kamaradoj distancis de ni, ke ili mem ne suferu, ke mia panjo malfacile serĉis okupon, ke ŝi havu por siaj infanoj almenaŭ manĝon, ke la paĉjo trairis kelkajn arestejojn kaj koncentrejojn.

Sed danke al Dio post fino de la puno, post preskaŭ tri jaroj, li revenis hejmen kiel la lasta de tiu tuta grupo kun la plej malgranda puno. La ceteraj bedaŭrinde poste anstataŭ hejmen foriris en “gazkameron”.

La paĉjo revenis en malbona sanstato, li pezis nur 44 kilogramojn kaj pro tio, ke faŝistoj permesis al li reveni hejmen kaj ke ili “nutris” lin, ili volis rekompence forpreni duonon de nia loĝej-ekipo; tamen post la granda peto kaj ploro de la panjo, ili ŝtelis la ŝparlibron kun sufiĉe da deponita mono, koncertan fortepianon, skribmaŝinon, sur kiu la paĉjo skribis kaj du grandajn la plej valorajn oleo-pentraĵojn.

Estas rememoroj, kiuj restas dum la tuta vivo. Ekzemple kiel mi kelkfoje vespere biciklis kun panjo sen ia ajn lumo en ian vilaĝon celante peti ekslernantinon de mia panjo pri iom da faruno por baki kukojn. Panjo havis ĉirkaŭ sia kolo du tolsaketojn kunligitajn per pli larĝa rubando – kvazaŭ grandajn mamojn. Ŝi vestis sin en larĝan mantelon. Kiam kontraŭ ni veturis aliaj biciklistoj, same en la vespera mallumo (komun-publika lumigado de ŝoseoj ne ekzistis), panjo demandis ilin, ĉu la aero estas pura. Tio estis jam

la konata diro. Kiam la respondo ne estis jesa, ni devis ĉirkaŭveturi la vilaĝon trans kamparaj vojetoj, por ke ne kaptu nin germanaj policaĵ gardistoj. Mi memoras, ke dufoje estis aŭdebla proksimiĝanta motoro de polica aŭto kaj panjo nur ekkriis: “En la fosaĵon!” kaj ni tuj desupris kun la biciklo kaj enkuŝis tie. Tiuj estis teruraj momentoj. Ĉe la rememoroj pri tiu tempo mi ĉiam admiris panjon pro ŝia kuraĝo.

Kiam la sanstato de mia paĉjo pliboniĝis kaj li jam povis labori, li trovis okupon de kontisto en seĝejo de la vilaĝo Pöedmoice.



Jarmila kun la gepatroj kaj frato.

Mi estis “totale devige insertita”, tio signifis, ke kiam la lernejoj estis fermitaj, mi devis esti okupita aŭ en la plej granda fabriko je eksplod-materialo de nia urbo en Semtín aŭ en agrokulturado. Mi timis labori en eksplodaĵ-fabriko, sur kiun okazis oftaj flugatakoj, eĉ bombardado kaj do mi veturis helpadi sur kampoj. Alian eblon mi ne havis, ĉar kiel filino de eksa arestito mi ne povis esti akceptita en pedagogia instituto, kaj ceteraj lernejoj jam estis fermitaj.

Sed ankaŭ la vojaĝo per vagonaro al la vilaĝo, kie mi laboris, ne estis trankvila. Imagu, ke vi sidas en vagonaro kaj subite hurlegas sirenoj. El la fenestroj vi vidas proksimiĝantan aron da aviadiloj. La trajno haltas inter kampoj, vi devas elsalti el la vagonaro kaj kuri plu en la kampon kaj tie ĉi ekkuŝiĝi. Kaj vi havas la solan ideon, ĉu vi ankoraŭ ekvidos viajn gepatrojn.

Ankaŭ mi ne povas forgesi pri nokta aviad-atako, kiu okazis je la 22.7.1944. Panjo vekis min kaj mian fraton, donis al mi kovrilon kaj ni ĉiuj rapide kuris al la fino de nia ĝardeno, kie estis elfosita bombŝirma bunkro por 6 personoj. Sed, ĉar ni tie havis kusenojn kaj kofron, la patro jam tie ne havis lokon kaj restis sidanta apude sub juna ĉeriza arbeto. Poste li rakontis al ni tiujn terurajn momentojn de falantaj lum-raketoj en nia proksimeco. Inferan bruon kaj tremadon de la tero ni sentis ankaŭ en la kaŝejo. La aviadiloj eraris kaj anstataŭ atingi fabrikon de mineralaj oleoj, kiu estis sur la mala rando de nia urbo, ili faligis bombojn al ĝardenistoj, ĉar brilis la vitrejoj kaj kelkaj bomboj falis kelkajn centojn da metroj de nia ĝardeno.

La dua aviad-atako okazis 24.8.1944 post la tagmezo, kiam mia panjo kun la frato biciklis hejmen el krematorio; tie ili ordigis familian tombon. La rando de nia urbo tiam estis libera, kampa, nur kelkaj arboj apudis la vojon kaj la sirenoj en tiu ĉi urboparto ne estis aŭdeblaj. Subite super ili aperis aro da aviadiloj, kiuj sin preparis bombardi. Panjo kun la frato tuj ekkuŝiĝis teren apud bicikloj proksime de kelkaj arboj kaj ili vidis fali multajn bombojn direkte al la fabriko Rafinerio de mineralaj oleoj kaj al la trajno-stacidomo. Ili vidis eksplodadon de la bomboj. Iu viro, kiu biciklis post ili kaj ankoraŭ veturis sur la libera spaco, estis pro ondo (vento-kirlo) deĵetita el la biciklo. La panjo kun la frato bonŝancis, ke ili jam estis inter la arboj, kie la kirlo jam ne

estis forta. Poste ni estis informitaj, ke unu bombo atingis ankaŭ kontraŭ-aviadan kaŝejon en la stacidomo, kaj nur tie mortis pli ol 200 homoj (foto el malnova ĵurnalo montras parton de la stacidomo post bombardado).



Nur la tria aviad-atako, kiu okazis la 28-an de decembro 1944 en Pardubice, atingis denove la fabrikon ĉe la plua parto kaj krom tio estis ruinigitaj multaj proksimaj stratoj kun la loĝdomoj.

FINO DE LA MILITO EN MAJO 1945

Post ses jaroj, la 8-an de majo, finiĝis la dua mondmilito. La naziismaj surskriboj estis forigitaj, sur la domoj flertis denove ĉeĥoslovakiaj flagoj. Kun entuziasmo estis bonvenigataj la rusaj liberigintoj.

Estis maja dimanĉo kaj mi akompanis mian avinon en la preĝejon. Ĉe la reveno jam ĉe la rando de nia strato mi vidis la panjon tordi manojn kaj multe gesti, ke ni rapidu. Antaŭ nia domo estis grandega amaso da sablo kaj brikoj. Kio okazas?

Panjo plendis, ke ni devas foriri el nia propra domo ĝis la 18-a horo, ke ĉi tie la rusaj soldatoj – kiel en la plej granda domo de la strato – havos soldatan manĝejon, kuirejon kaj en la unua etaĝo ili loĝos, tranoktos, ke ni tie devas lasi ankaŭ kusenojn kaj ni povas kunpreni nur ion plej necesan. Sed kien ni iru? Ni estas 6 personoj!

La najbaro el la apuda strato proponis al ni, ke kelkajn tagojn ni povos resti en la kela loĝejo de iliaj subluantoj, kiuj restadas ian tempon en montaro. Kaj tiel tri tagojn ni tie tranoktis kiel sardinetoj sur la planko sur la kovriloj ankaŭ kun geavoj, kaj poste nacia komitato permesis enloĝigi nin en duĉambran loĝejon apartenintan al germana familio, kiu devis ellandiĝi.

Niaj “karegaj liberigintoj” forveturis post tri monatoj, sed forlasis nian domon en terura stato – laŭ statistiko de la nacia komitato ĝi estis la tria plej multe ruinigita domo en la tuta urbo. Mi volas tiun etoson iomete proksimigi al vi, kvankam mi ne ŝatas rememori pri tio.

Mi jam skribis, ke malantaŭe en la ĝardeno ni havis kontraŭaviadan bunkron, do profundan elfosan kavon kun benkoj por 6 personoj, supre kovritan pere de lignaj tabuloj kaj argilo; la rusoj tiun “plafonon” dekovris kaj en la kavon ĵetadis ĉevalajn krur-ostojn, kraniojn kaj ĉiujn forfalaĵojn el la soldata kuirejo. En la teretaĝa kuirejo ili plivastigis la fornelon tra la tuta ejo tiel, ke pro tiu varmego fendetis ambaŭ pordoj. En tiu monato majo estis tre varma vetero kaj super la kavo kun forfalaĵo flugis centmiloj da muŝoj.

Septoj de ambaŭ ĉambroj estis forigitaj kaj en “granda salono” restis post la foriro de soldatoj multaj seĝoj kaj tabloj. En la trapasejo kaj sur kelaj ŝtupoj estis surĵetitaj proksimume 30 malplenaj bareloj de alkoholaĵo Vodka, la palisa barilo sur la korto estis falinta al najbaroj post amaso da ligno kaj karbo.

La florarboj en la ĝardeno estis primorditaj de la bovino, kiu laŭdire promenis tie kaj sur la korto plendis porko, kiel rakontis la najbaroj. La kuniklejo estis malfermita, kvin kunikloj eble estis gustumitaj de la soldatoj, en la loko de kokinejo kuŝis kelkaj mortaj kokidoj.

La loĝejo en la unua etaĝo aspektis ankoraŭ pli malbone. La banĉambro fermita, la ŝlosilo perdita, sur la pordo de tiu ejo fiksita elverŝujo kun plena sitelo da akvo, de kiu estis grandaj akvoflakoj ĝis malsupren tra la tuta ŝtuparo. Post la malfermo de la banĉambro – la bankuvo estis plena de malagrade odoranta ranca ŝaŭmita kremo kaj en ĝi – imagu – du patrinaj ĉapeloj. En la libroŝranko – el plimulto de tolbinditaj libroj de nia nacia verkisto Alois Jirásek estis eltonditaj ŝu-alplandaĵoj.

Ankaŭ la ŝlosilo de la necesejo estis perdita kaj tiu ĉi loko estis ŝanĝita en angulon de la ĉambro ĉe malfermita fenestro kun granda amaso kaj malplaĉaodoro. En la dua etaĝo en la unua kamero estis razistejo – laŭ ŝaŭmo sur la muroj kaj en la dua kamero eble ŝuejo, ĉar tie restis ŝuista botŝtipo.

Sed en tiu tempo oni ne povis ion diri kontraŭ niaj rusaj liberigintoj. La unua okupacio finiĝis kaj komenciĝis la dua. En 25.2.1948 la potencon en la registaro transprenis komunista partio de Ĉeĥoslovakio, en kies regado estis maljuste kondamnitaj 230 000 homoj. La totalisma reĝimo – socialismo – daŭris preskaŭ ĝis la jaro 1989.

Mia granda deziro estas, ke niaj infanoj, nepoj kaj pluaj posteuloj travivu nek militojn, nek pluajn okupaciojn.

Pardubice la 7-an de marto 2013



Jarmila kun la filino Mirka kaj la dumonata pranepo Sebastian.